

VII Mastrumado

40 : 64.011

LINGVAJ PROBLEMOJ EN LA MASTRUMADA EKONOMIO de Prof. D-ro Elli Saurio, ĉe Universitato de Helsinki

Ekster la argumentoj, kiujn oni povas prezenti por la enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo de la scienco ĝenerale, du specialaj motivoj pledas por ĝi el la vidpunkto de la **mastrumada sciencaro**.

Unue ĉi tiu grupo de sciencoj, kiu enbrakigas ĉiujn agadojn en la kadro de la hejmo, kaj kies ĝenerala nomo estas angle **home economics**, germane **Hauswirtschaft**, estas esence tre neomogena, ĉar ĝiaj objektoj estas la nutrado, la vivrimedoj kaj la preparadoj de la manĝaĵoj, teksaĵoj kaj vestaro, loĝejo kaj ĝia provizado per maŝinoj kaj alia ekipaĵo, la rilatoj inter la familianoj, edukado al mastrumado, mastrumada ekonomio kaj de institucia mastrumado. Ĉar la sciencoj, sur kiuj la nomitaj sciencoj baziĝas aŭ proksime koordiniĝas, nuntempe evoluas rapide, estas necesaj en ĉiu fako de la mastrumada sciencaro sciencaj specialaj publikaĵoj, kiuj kolektas ĉiujn rezultojn de la esplorado en koncerna fako. Ĉar mankas specialaj publikaĵoj, la esploristoj publikigas siajn laboraĵojn en multaj publikaĵoj ekster la mastrumada sciencaro. Tiel ekz. studento de mastrumada ekonomio devas konstante sekvi la publikaĵojn de komerca kaj nacia ekonomio, sociologio, sociolitiko, statistiko k. a. en diversaj lingvogrupoj. Tamen povas okazi kiel al la referanto, ke jarojn post la publikigo de doktora disertacio oni ricevas informon per persona kontakto, ke simila rezulto jam antaŭe estis publikigia en lingva teritorio fremda al la disertinto. La informanto tamen ne memoris la nomon de la verkinto nek la nomon de la publikaĵo. La fondo de bibliografio, propra scienca organo kaj eldono de aliaj publikaĵoj jam finance premias komunan lingvon, per kiu ĉiuj studentoj de koncerna scienco kaj ankaŭ la praktikantoj de proksimaj branĉoj povus ilin utiligi.

La nomita ekzemplo pri forgesita rezulto de esplorado koncernas malgrandan eŭropan landon, kie ne ekzistas katedro de mastrumada

sciencaro, kaj kie ne estas uzata la lingvo ĝis nun prefere uzita en ĉi tiu scienco. Sama sorto povas frapi la sciencajn rezultojn atingitajn en multaj aliaj landoj kaj prezentitajn per iliaj naciaj lingvoj, eble, ĉar li atingis ilin kiel flankajn faktojn, por li ne esence gravajn, sed kiuj por alia esploristo povas havi fundamentan signifon en la formulado de iu teorio. En la mastrumada sciencaro, grupo de relative junaj sciencoj, Esperanto estus uzenda ankaŭ por prezento de la teoriaro per koncizaj sistemaj lernolibroj, samtempe kreante ekzaktan kaj unuecan terminaron. Ĉi tio koncernas precipe la mastrumadan ekonomion, kie jam la centra koncepto **ekonomio** aperas en diversaj lingvoj apud la purigita senco uzata en la moderna ekonomia scienco ankaŭ en arkaj kaj sencoj. Tio evidentiĝis ekz. el tio, ke la angla esprimo **home economics** celas la tutan agadkampon de mastrumado, dum **household economics** nur unu branĉon de ĝi. La pridiskutado de la terminologio daŭris plurajn jarojn, sed ŝajnas evidente, ke estas bezonata komuna lingvo kiel Esperanto por difini kaj termini la konceptojn. La tradiciaj terminoj en la naciaj lingvoj — finna lingvo kunkalkulita — estas rezulto de historia evoluo, kaj la koncepta enlavo de ili ĉiam dependis de la dominanta ekonomia stadio. Se oni normigas la terminojn per Esperanto, la esplorantoj de diversaj landoj povas interparoli ne-bezonante oferi multajn paĝojn por antaŭe difini la terminojn, kiujn ili uzas.

Alia motivo, kaŭzanta fervoran deziron pri enkonduko de Esperanto, estas la bezono prepari al personoj, kiuj ricevinte duagradan instruon, sin okupas sur la kampo de praktika mastrumado, la eblecon mem konatiĝi kun la eksterlanda faka literaturo. Ĉi tiu problemo prezentis sin en Finnlando, kiam dum kvin jaroj jam nomitaj personoj ricevis okazon en somera universitato ekzameniĝi pri kursoj, kiuj respondas al tiuj de mastrumada ekonomio en la Universitato de Helsinko. Tiaj kaj similaj ekzamenoj de aliaj sciencoj estas postulataj per dekreto de 1962 por la oficoj de lektoro de mastrumado en la ŝtataj duagradaj lernejoj (ĝeneralaj). Kvankam la referanto eliris el la vidpunkto ke la studado de mastrumada ekonomio por tiu ĉi celo estu efektivebla per la nura gepatra lingvo, ne estas eble eviti la uzon de fremdlingva literaturo, se oni volas atingi pli altan kompetentecon. Tio tamen kondukas en nia lando al la postulo de bona kono, krom la dua enlanda lingvo, ankaŭ de angla kaj germana lingvoj, kaj tiel la lingvaj studoj fariĝas la ĉefa studobjekto kaj eble vera obstaklo al enprofundiĝo en la sciencon mem. Ĝis nun miaj lernantoj en somera universitato devis uzi tradukanton, kio fariĝas multekosta kaj ofte kondukas al miskompreno de la originalo. En ĉi tiu demokratigo de scienca studado, kiu montriĝis tre fruktodona en ĉi tiuj fakoj proksimaj al praktika vivo, de la parto de empiria esplorado, Esperanto estus salutinda solvo, kiel kompare facile lernebla lingvo, kiu samtempe donas provizon da kulturvortoj, kaj ekster tio ebligas studvojaĝojn memstarajn al la institutoj alilandaj de la fako. Sciante, ke okazos en Parizo internacia kongreso de mastrumada instruado, kaj ke al ĝi anonciĝis 70 instruistoj el Finnlando, oni ekpensas, ke la kongresaj prelegoj kaj diskutoj, kiuj laŭsperte estas tute perdataj de la plimulto, multe pli utilis, se Esperanto estus la kongresa lingvo.

Ĉiu scienca biblioteko devas posedi

la libron

SCIENCAJ STUDOJ

bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj

eldonita okaze de 50-jara jubileo de
INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

sub redakto de

PAUL NEERDAARD

La libro enhavas 38 sciencajn artikolojn (alie nepublikigitajn), verkitaj de konataj sciencistoj el diversaj sciencaj branĉoj:

lingvistiko
historio
juro
muziko
poezio
astronomio
matematiko
geologio
mineralogio
kemio
tehnologio
zoologio
agronomio
medicino ktp.

240 grandformataj paĝoj, prezo 25 danaj kronoj (anglaj ŝilingoj) aŭ 50 steloj aŭ 3,50 dolaroj aŭ la egalvaloro

Mendebla ĉe la

Eldonejo **KOKO**, Randbölvej 4, KOPENHAGO F, Danlando
pere de la librovendejoj, pere de la delegita reto de ISAE,
aŭ kun la aldonita bankĉeko ĉe la sekretario de ISAE al la
adreso: Prof. D-ro B. Popović, Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio.